



# BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 1 • Januaro/Februaro 1959

## El la historio de la horlibro

La ideo, krei horlibron, ekzistis jam tri jarcentojn antaŭ ol la unua fervoja vagonaro veturis. En la jaro 1520 aperis en la tiama „Supera Germanio“ listo pri la vojoj, la tielnomata „Itinerar“, enhavinta i. a. la liniojn Antwerpen — Frankfurt, Frankfurt — Nürnberg — Venezia-Roma — Genova, Ulm — Milano, Augsburg — Venezia k. t. p. inkluzive la interstacioj kaj distancoj. En 1548 la strasburga universitata instruisto Sebastian Brant, konata el la literatura historio, eldonis libron kun detaloj pri la „kuro“ de la grandaj vojaĝstratoj kaj pri la distancoj de la plej elstaraj lokoj. La kompendio, kiu aperis ĉirkaŭ la jaro 1563, enhavis elirante de Augsburg la tiamajn komercstratojn al Antwerpen, Basel, Bologna, Budapest, Danzig, Krakov, Lyon, Milano, Paris, Roma kaj Venezia. La unuopaj urboj estis klare anoncataj kun siaj distancoj. Menciinda el la tiama epoko estas la pli malpli fidinda „Vojaĝlibreto“ krome la „Ekstrakto kaj kronumo de ĉiuj montriloj“ aperinta en 1593 en Köln kaj la „Vojaĝlibro tra Supera kaj Malsupera Germanio“, eldonita de Martin Zeiler en 1651. La „Virtemberg-a libro por portistoj“ aperinta en 1749 enhavis i. a. jam tarifojn por la transporto de leteroj. Portisto, kiu devis forporti leterojn, ricevis po ĉiu mejlo 15 krucerojn.

La daŭriga plifrekventigo de la poŝttransportoj efikis dum la sekvontaj tempoj konsiderindan kreskadon de la vojaĝkompendioj. En la jaro 1844, do 9 jarojn post la inaŭguro de la unua germana fervojo Nürnberg — Fürth (7. 12. 1835), estas eldonita de la barono de Zedlitz-Neukirchen verko, kiu enhavis krom la fervojaj tempoj pri alveno kaj forveturo ankaŭ notojn pri la veturado per vaporsipo.

Kiel unua germana horlibro povas esti opiniata la kompendio, eldonita en 1845 de la poŝtsekretario U. Hendschel en Frankfurt. Ĝi ampleksis 166 paĝojn kaj entenis la tempojn pri alveno kaj

forveturo de la poŝtkaleŝoj kaj vagonaroj en pli ol 500 lokoj, krome la distancojn kaj veturprezojn. Tiu libro aperis ekde aprilo 1847 ĉiumonate en granda formato kiel „Telegrafo por poŝtaj, fervojaj kaj vaporsipaj komunikoj en Germanio kaj en la najbaraj landoj“. El tiu „Telegrafo“ evoluis dum la jaroj la mondfama kaj multe uzita horlibro „Telegrafo de Hendschel“.

La jaro 1850 estas la naskiĝjaro de la regna horlibro, la unua kun oficiala karaktero. Ĝi havis amplekson de 128 paĝoj kaj estis kreata por bezono de la poŝto. Ĝi, la poŝto nome, funkciigis la unuajn publikajn kaj regulajn transportilojn pere de siaj kaleŝoj. Kiam ekstis la fervojoj, unue ne ekzistis centro, kiu estus havinta intereson aŭ eblecon kunigi ĉiujn fervojajn liniojn. La unua oficiala horlibro enhavis la horarojn de 200 fervojaj linioj en Germanio, Aŭstrio, Italio, Belgio, Francio, Anglio, Svislando kaj Nederlando, krome la tarifojn por pasaĝeroj kaj kaleŝoj. Ĉar la fervoja reto estis ankoraŭ malkompleta, la riĉuloj kutimis kunpreni siajn proprajn kaleŝojn. (100 jarojn poste okazis la sama kun la aŭtomobilposedantoj.) La nomita libro ricevis en la jaro 1875 flavan kovraĵon, en 1878 la titolon „Regna horlibro“ kaj estis verkata ĝis 1925 de la horlibra oficejo de la Regna Poŝtministerio. Nur ekde 1926 ĝi estis eldonata komune kun la fervojo. La fervojoj mem eldonis nur konvenajn kaj malmultekostajn horlibrojn pri negrandaj trafikretoj.

Kiam la privatuloj Hendschel kaj Storm rezignis la pluan eldonon de siaj horlibroj, aperis ekde 1927 iom post iom la oficialaj horlibroj pri Norda-, Meza- kaj Orienta Germanio, pri Okcidenta- kaj Sudokcidenta Germanio kaj aparte pri Bavario. Ĉar bone manipulebla horlibro, destinata sole al la granddistanca trafiko, ne ekzistis, la Regna Fervojo decidis noveformi la Mitropa-horlibron



laŭ la plej modernaj vidpunktoj kaj reeldoni ĝin kun ĝia filio, la Mitropa.

La jaro 1932 estigis fundamentan ŝanĝon en la tutaj. Ĝis tiu tempo ĉiu horlibro montris alian liniigon kaj numerigon. Ankaŭ estis uzata por ĉiu libro alia presmaniero, sekve de kiuj la informiĝo de la pasaĝeroj malfaciliĝis. La Regna Fervojo elektis unuecan formaton. La horaraj linioj estis kunigataj laŭ trafikaj vidpunktoj. Speciala klare legebla literspeco estis elektata post eksperimentoj dumjaraj. Krome la linioj estis numerigataj laŭ trafikregionoj tiamaniere, ke hodiaŭ ĉiu linio estas trovbla ĉiam sub la sama numero en la elpendantaj horaroj, poŝlibretoj aŭ en la horlibroj. La oficialaj horlibroj povis plibonigi tiamaniere la eblecon por superrigardi kaj fidindigi ĝin. Somere de 1933 aperis unufoje la oficiala „Germana Horlibro“. Ĝi kunigis ĉiujn lokajn kaj regionajn horlibrojn. En 1935 estas nove eldonita la „Oficiala Germana Granddistanca Horlibro“ kaj la

„Oficiala Germana Eksterlanda Horlibro“ enhavanta i. a. partajn horarojn de la plej gravaj linioj en Eŭropo.

La dua mondmilito finis ĉion. Fine de 1945 aperis nur kelkaj poŝhorlibretoj laŭ la modesta amplekso de la tiama „normala trafiko“. Germanio estas dividita en zonojn, el kiuj ĉiu zono eldonis sian propran horlibron. 1947 estis eldonata unu sola horlibro pri la okcidentaj okupitaj zonoj, ekde 1950 la horlibro en ĝia nuna aspekto. Ĝi evidente montras la frekventecon de la nuna vigla trafiko en la okcidenta Germanio, ĉu iun provincan pasaĝertrajnon ĉu la internaciajn Trans-Eŭrop-Ekspresojn. Menciinda estas la uzo de nia Internacia Lingvo Esperanto jam de jaroj kaj en la horlibro kaj en la horareto. La plej belan vestaĵon havos la horlibro nur, kiam ambaŭ partoj de Germanio eldonos unusolan horlibron.

(Laŭ artikolo de la „Oberbetriebsleitung West“ en Essen verkita de W. Barnickel)

## Wir bitten alle um Mithilfe

Im vergangenen Jahr war es 10 Jahre her, daß die Vereinigung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten nach den Wirren des Krieges wieder aus der Taufe gehoben wurde. Wir beabsichtigen, eine „Geschichte der deutschen Eisenbahner-Esperantisten“ zusammenzustellen. Das dazu notwendige Material ist ab 1951 vorhanden. Für die frühere Zeit (1948—1950) sind die Unterlagen jedoch lückenhaft. Ganz besonders aber aus den Jahren des 3. Reiches und vorher fehlen uns jegliche Anhaltspunkte. Wir bitten deshalb alle Mitglieder um ihre Mithilfe. Bitte stellen Sie uns alte Kongreßbücher (Salzburg, Paris) zur Verfügung. Wer war in München und Göttingen dabei? Wer hat irgendwelche Erinnerungsstücke aus der Zeit vor dem Kriege?

Diese Dinge möchten wir für die geplante Geschichte auswerten, sie aber gleichzeitig sammeln und zusammenstellen, damit sie dann auch für Ausstellungen der Gruppen zur Verfügung stehen könnten. Jedem, der seine Erinnerungsstücke nicht verschenken will, bleibt das Eigentumsrecht gewahrt. Wenn Sie es aber wünschen, erhalten Sie Ihr

Eigentum nach Auswertung zurück.

Wer kennt Personen, die vor dem Kriege unserer Bewegung angehört haben? Mitteilungen und Einsendungen erbeten an die Sekretärin, Frau Kruse, Bundesbahn-Sozialamt, Frankfurt/M.

KELI aranĝos sian 12an kongreson en la kastelo **Nijenrode, Breukelen** — apud la urbo Utrecht-Nederlando, de sabato la 25a de julio, posttagmeze, ĝis sabato la 1a de aŭgusto, matene. Anoj kaj samideanoj estas tre kore bonvenaj.

Ĉeftemo de la kongreso estos:

„La atomepoko  
koncernas nin ĉiun“

Krome okazos studoj, distraj kunvenoj, ekskursoj, filmprezentadoj, k. t. p. La kongresejo estas en la fama kaj antikva kastelo, kiu situas en belega kaj granda parko. Prezo por la tuta kongreso, inkluzive restado, manĝadoj, tranoktoj kaj unu tuttaga ekskurso, estas proks. 95,— gld.

Informojn donos:

Sro J. van Keulen  
van Beethovensingel 91-a  
VLAARDINGEN-Nederlando

## Kiu subtenas nin?

Ni intencas aranĝi Esperanto-poŝtmarkkolektadon, por ke ni varbu per ĝi. Tiujn kolektaĵojn ni prezentos okaze de Esperantovarbaranĝoj, poŝtmarkekspozicioj ktp. Se eble, ĝi estos je dispono al ĉiuj fervojistaj Esperantogrupoj.

Kiu povas kaj volas donaci Esperanto-poŝtmarkojn? Bonvolu sendi la markojn al jena adreso:

Sozialwerk  
der Deutschen Bundesbahn  
Bezirksvorstand Frankfurt (M)  
Abteilung Kulturelle Betreuung  
Untergruppe ESPERANTO  
z. Hd. H. Dr. Lang

## Alta honorigo.

La ĉefkunveno de la Internacia Fervoja Asocio (UIC) elektis je la 1. 12. 58 prof-on, dr-on jur. Oeftering prezidanton de la asocio. Ekde ĝia fondiĝo je la 1. 9. 22 per tio estis transdonata la prezidado unufoje al la Germana Federacia Fervojo. Tiu alta honorigo al la ĉefprezidanto de la Germana Federacia Fervojo nelaste sekvis al tio, ke prof. d-ro Oeftering inter alie prefere kaj emfaze subtenis kaj flegis la rilatojn al la eksterlandaj fervojoj. trad. el Eisenbahn-Ingenieur 1/59 Steinig



## 11. IFEF-Kongreso in Linz

Wie alljährlich werden auch diesmal die Anmeldungen zum Kongreso über den GEFA-kasisto BA Denk, Prüfungsamt BD Frankfurt/Main eingereicht.

Meldeschluss: 31. 3. 1959.

Gleichzeitig mit der Anmeldung ist der Kongresbeitrag + 1,— DM für GEFA-Mitglieder, 0,50 DM für teilnehmende Angehörige oder 2,—

DM für Nichtmitglieder auf Konto 40372 Sparda Frankfurt/Main oder Postscheckkonto Nr. 56908 Frankfurt/Main zur Gutschrift für Kt. 40372 einzuzahlen. Rechner 100 Schill. = 16,— DM. Anmeldevordrucke hat jedes Mitglied im IFEF-Bulteno erhalten. Zusätzliche Vordrucke im sekretariejo, Sozialamt BD Frankfurt/M. anfordern.

**Svislando vokas vin:** De la 15a ĝis la 20a de junio okazos en la Feriodomo Herzberg internacia feriosemaĵo por fervojistoj kaj ties familianoj. Prezo por pensiono kaj ekskursoj, sed sen la semajnfina ekskurso — 75,— Frs —. La partoprennombro estas limigita je 65 personoj, lasta limtempo por aliĝo la 31a de majo. Pliajn informojn petu de Hans Hunkeler, trajnĉefo, Girixweg 31, Aarau/Svislando

La LKK komunikas

## KONGRESA INFORMILO N-o 4

### Fervoja rabato por emerituloj

Okaze de la 11a IFEF-kongreso en Linz kaj la postkongreso en Wien la aŭstria fervojo eksterordinare donas al eksterlandaj fervojistaj emerituloj 50% rabaton — sub jenaj kondiĉoj:

1. Eksterlandaj emerituloj, kiuj deziras partopreni la 11an IFEF-Kongreson kaj postkongreson Wien devas peti formularon de LKK Linz (kontraŭ 2 respondkuponoj). Loka kongresa komitato por 11a IFEF-Kongreso, Linz/Donau, Bahnhofstraße 3 (Austrio).

2. Post ricevo kaj pleniĝo, ili devas sendi ĝin al GEFA-Kasisto Denk, Ffm., kiu atestos per fakgrupstampo, ke la koncerna kongrespartoprenanto fakte estas fervojista emeritulo kaj membro de IFEF.

3. GEFA-kasisto sendos tiujn ĉi proponojn al LKK Linz, kiu post denova kontrolo sendos formularojn al ĝenerala direkcio Wien.

4. La resendo de plenigita formularo al LKK nur povas esti

akceptota kun samtempa aliĝo al la 11a IFEF-kongreso kaj laŭdezire al la postkongreso.

5. Limdato estas la 31a de marto 1959, ĉar poste ni ne povas garanti, ĉu la proponanto ĝustatempe ricevos la rabatbileton.

(Por familianoj de emerituloj ni ne sukcesis ricevi rabaton.)

**Grava sciigo:** Laŭ informo de la LKK, farita al demando niaflanka, la 50 ŝlg. pagendaĵ kun la kongreskotizo por rezervado de ĉambro estas subtrahotaj de la entuta lupago por la ĉambro.

Do ili estas nur anticipa kaj ne kroma lupago.

**Senpage vi povas prunti** sonbendon pri la festparolado de prof. Lapenna farita je la UE-Kongreso en Mainz. Mendu ĉe TBI Biernath, MA Braunschweig

## La stacidomo sen trajnoj.

— Staciestro kaj kvar dungitoj. —

Kuriozaĵo en la historio de la Germana Federacia Fervojo ekzistas sur la insulo Norderney, kie troviĝas tiel nomata stacio, kvankam tie neniam alvenis aŭ ekveturis trajno. Ekzistas nek kajoj nek reloj, ankaŭ ne „Hindenburg-digo“ kiel al la malproksima norde situanta insulo Sylt, kaj pramoj same ne trafikis. Tiu stacidomo de la Germana Federacia Fervojo kkn staciestro kaj kvar dungitoj, kkn biletgicejoj kaj pakajhaloj tamen estas

grava, malgraŭ la cirkonstancoj rimarkindaj.

Sole de post 1949 la turisttrafiko inter la kontinento kaj la insulo plialtiĝis je pli ol la trioblo. Laŭ kontrakto inter la fervoja direkcio Münster kaj la ŝipkompanio en Norddeich ĝi (la ŝipkompanio) transprenas ĉiujn transporttaskojn inter Norddeich kaj Norderney, kiujn alikaze devus plenumi la Federacia Fervojo.

Tial la „stacidomo“ en Norderney vendas biletojn al ĉiuj stacioj

de la federacia teritorio. Dum nur unu sola monato en la pasinta somero estis vendataj 1550 biletoj, ekspedataj 1800 pakajsendaĵoj kaj ankaŭ estis akceptataj rapidendaĵoj, ekspressendaĵoj kaj fretaĵoj, kiuj en kunlaboro kun la ŝipkompanio per veturiloj estis transportataj al la vaporŝipo kaj nur en Norddeich transŝarĝataj sur la relojn de la Federacia Fervojo.

Tradukita el „Göttinger Zeitung“

Busse



# El la Grupoj!

**Frankfurt:** Jarraporto konciza. En malgranda rondo ni festis Karnavalan Vesperon, aranĝis novan kurson por komencantoj, gastigis francan kolegon. Varbvespero kaj prezentado de la filmo „La vojaĝo al Marseille“, partoprenis la IFEF-kongreson ĉ. 20 s-anoj; promenad-ekskurso al Dreieichenhain kune kun la „urba“ grupo; ni partoprenis multnombro la UEA-kongreson en Mainz kaj la „nacion“ en Nürnberg; fine ni festis la Zamenhof-tagon ree kune kun la „urba“ grupo. Je la lasta jartago ni elkore gratulis nian bonkonatan kolegon kaj ĉefkasinon de GEFA, la senlancan idealiston Otto-Friedrich Denk okaze de lia 40-jara deĵorbuleo.

Ĝen la „kulminoj“ de nia Esperantaro. Sed la plej kontentiga sukceso: la duono de niaj komencantoj restis ĉe ni!  
Lang

**Hamburg:** Kiel kutime ni fervojistoj kun la loka Esperanto-societo festis nian Zamenhof-feston je la 7a de decembro. La fervojista grupo mem ne povas aranĝi tian feston, ĉar nia rondo estas tro malgranda. Sed la bona kontakto kun la loka Esp.-grupo ebligas nian ĉeston. Mi volas nur raportiti, ke ĝi ree estis granda sukceso. Partoprenis pli ol 80 personoj. La virina horo kantis belajn kantojn esperante, la kabareda grupo prezentis teatraĵon. S-ro Bünemann faris la festparoladon kaj skizis bele kaj trafe el la vivo de nia Majstro. Post la solena parto ĉiuj festmanĝis komune kaj sekvis tiam la amuza parto kaj dancado ĝis noktmezo.

Laŭ miaj rondemandoj ĉiu partopreninto estis tre kontenta kaj ankaŭ kelkaj novaj samideanoj trovis la vojon al ni. Niaj fervojistaj kolegoj tre laŭdis tiun vesperon. Mi mem bedaŭris mian foreston por deĵoraj kaŭzoj, sed deĵoro estas deĵoro.  
Hartjen

**Kaiserslautern:** En la bela, nova kantino de la stadidomo Kaiserslautern kunvenis la 14an de dec. la esperantistaj kolegoj de la direkcia regiono Mainz por festi Zamenhof-Solenon. Subsekcio S-ro Eisenbarth sukcesis feni al la kunveno speciale varman atmosferon. Ne laste kaŭzis la belan sukceson de la kunveno la laboro de la Fervojista Esp.-grupo Kaiserslautern, kiu estis ornaminata la apudĉambro de la kantino per branĉetoj abiaj, kandeloj, Esperanto-transparento ktp. en mirinda maniero. — S-ano Eisenbarth malfermis la solenon kaj salutis la partoprenintojn el Speyer, Mainz, Schriesheim (Bergstr.), Kaiserslautern kaj Neustadt (Weinstr.). Poste parolis s-ano Schmidt (Kaiserslautern). Li rakontis pri la historio de la Fervojista — Esp.-grupo de Kaiserslautern. Precipe

li akcentis, ke la grupo Kaiserslautern ĉiam iris man-en-mane kun la loka grupo, kaj ke estis la fondintoj de la unua Esp.-grupo en Palatinio la fervojistaj esperantistoj de Kaiserslautern. Post la dua mondmilito ree estis fervojistoj, kiuj denove fondis la Esp.-grupon. Per forta aplaŭdo dankis la ĉestintoj la maljunan samideanon kaj kolegon. Ankaŭ s-ano Hund (Schriesheim) — same kiel s-ano Schmidt unu el niaj plej konatj pioniroj — ĝojigis la aŭskultintojn per mirinde vigla kaj altkvalita parolado. — Precipe estas menciinde, ke ankaŭ la prezidanto de la sekcio „Kultura helpo kaj horoj kaj orkestroj“ sinjoro BOI Schuster de BSW Mainz restadis kelkajn horojn en nia rondo. Li esprimis sian ĝojon pri la evidenta ekflorado de la fervojista Esperanto-afero en la direkcia regiono Mainz. Li promesis sian plenan helpon rilate nian laboron. — Post tio raportis s-ano Riththaler (Neustadt/Weinstr.) pri sia deĵoro dum la UK en Mainz. Je la fino de la oficiala parto ankaŭ bela surprizo: subsekcio S-ro Eisenbarth transdonis donacojn al pro ilia laboro en la jaro 1958 meritaj kolegoj. — Posttagmeze oni travivis agrablajn horojn en samideana kaj kolega rondo. Sonbenda muziko plibeligis la oficialan parton de la soleno kaj ankaŭ la posttagmezon. — Tiu jarfina kunveno estis evidente sukcesplena; certe ĝi helpis fortigi nin por nia plua komuna laboro: la disvastigo de Esperanto precipe inter niaj kolegoj.  
Reinhold Riththaler

**Nürnberg:** Jarraporto: La kurson por komencantoj finis en aprilo 5 partoprenintoj, el kiuj 3 faris ekzamenon. Dum la UE-kongreso en Mainz deĵoris 3 el niaj membroj en la kongresejo kaj unu partoprenis la Cseh-seminaron. Honora tasko por ni estis la preparo de la dua nacia fervojista renkontiĝo en oktobro. Ni faris nian plej bonan por sukcesigi la aranĝon. La nürnbergga gazetaro favore raportis pri nia kunveno kaj Esperanto speciale. Ekde oktobro okazas nova cseh-metoda kurso por komencantoj, gvidata de kol. Feilner. Tre imponan Zamenhof-feston ni aranĝis kune kun la loka Esp.-grupo, kiu samtempe festis sian 70-jaran jubileon. Ankaŭ pri tiu ree detale kaj favore raportis la gazetaro. Nian bibliotekon ni pliriĝigis per kelkaj novaj libroj kaj eĉ la membronombro de la grupo ĝojige kreskis de 26 al 31 personoj. Ekstrakte el la „Bulteno“ de la grupo Nürnberg.  
Steinig

**Weiden:** La anoj de la Weidena grupo fervojista pravas, ke ili estas agemaj. Je la 25a de Oktobro ili aranĝis Esp.-varbvesperon. La fondinto de la ĉi tiea grupo TBI Rich. König verkis raporton pri la gruplaboro kaj ĝisnunaj sukcesoj

sub la titolo: „Reloj interligas la landojn, Esp. la popolojn“. La artikolo aperis en la gazetaro kaj invitis samtempe al la varbvespero. La hungaraj geedzoj d-ro Kondor, bone konataj en Esp.-rondoj, plibeligis la vesperon per lumbild- kaj sonbendprezentadoj pri sia hejmlando kaj hungara gimnazio en Kastl ĉe Amberg. S-ro Kondor parolis esp.-lingve kaj lia ĉarma edzino tradukis germane. Per tio ĉestintaj neesperantistoj havis la okazon konvinkiĝi pri la uzebleco de Esperanto. Samvespere estas prezentita Esp.-ekspozicieto kun multe da en- kaj eksterlandaj Esp.-varbfolioj, gazetoj, libroj, poŝtmarkoj kaj eĉ la biblio. Al la vizitintoj evidentiĝis, ke Esperanto jam ĉirkaŭas la tutan mondon. La du lokaj gazetoj raportis favore pri ĉi tiu aranĝo. Ankaŭ dum la nuna vintro okazos kurso por komencantoj. Partoprenintoj el la lastjara kurso pasigis sian libertempon dum septembro ĉe la maroka s-ano Ch.Thollet en Kenira. Kvankam komencanto, li tuj sentis sin hejme en la fremdlanda sfero helpe de la valora interkomprenilo Esperanto.  
Otto Hub

**Wuppertal:** Rerigardante la pasintan jaron oni konstatas, ke en la direkcia Wuppertal la movado ekvekis al nova vivo.

Dum la somero mi klopodis aranĝi kursojn por komencantoj post antaŭa vigla varbado.

En Solingen-Ohligs komenciĝis kurso la 25an de aŭgusto kun 11 fervojistaj kolegoj. Suŝe sperta esperantisto de la solinga grupo gvidis ĝin. La lecionoj okazis ĉiusemajne. La plej multaj kolegoj laboras en ŝanĝservo. Estas pro tio necese ripeti la lecionojn.

La dua kurso komenciĝis je la 4a de novembro en la riparejo Opladen. Jam la unua vespero montris bonan rezulton. Aperis 21 kolegoj. En la dua kaj la tria vesperoj eĉ kreskis la nombro de la partoprenantoj ĝis 28. Ĉefe gejunuloj partoprenas tre vigle, sed ankaŭ tutaj familioj lernas kun granda intereso la internacian lingvon.

La varbado estis forte subtenita de la loka gazetaro. La gazetoj prenis kelkajn detalajn raportojn, eĉ ilustritajn. La kurso gvidas la estro de la grandkonga Esperantogrupoj.

Danke al la subteno de la loka BSW-grupo Solingen-Ohligs mi povis fondi Esperanto-librejon.

Nia estonta celo estas la fondo de pluraj grupoj en la direkcia distrikto. En nia granda rondo ni havas kelkajn fidelajn membrojn, kiuj estas pretaj, fari la laboran malejoiste.

Mi esperas, ke la intereso restos ankaŭ estonte suŝe granda. Por la venonta kongreso mi jam nun havas kelkajn anoncojn.  
Graß

## Atentu la novajn limtempojn por ensendaĵoj je la fino de la bulteno!

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk. Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribaĵo unu-kaj-duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto Sendimo por manuskriptoj 15. I., III., V., VIII., X.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn